

Friedrich Hölderlin,

## La printempo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

La suno brilas, floras la kamparo,  
La tagoj venas milde kun floraro,  
Vespero floras kaj la tag' foriĝas,  
Malsupsren de l' ĉielo, kie tagoj iĝas.

La jaro kun sezonoj siaj komenciĝas,  
kaj pompe festotagoj disvastiĝas.  
Jen ekas hom-labor' kun nova celo,  
Mirinda estas de la mondo belo.

*Traduko de la Germana poemo "Der Frühling" de FRIEDRICH HÖLDERLIN (\*1770-03-20 – †1843-06-07) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2014-04-16.*

*Arg-989-1997 (2014-04-16 10:47:59)*